## „SOLA GRATIA"

...troviĝas sub la fama pilgrimloko HOSTÝN, de kie estas bone videbla pitoreska moravia urbeto BYSTŘICE pod Hostýnem. La tuta ripozejo estas uzebla tutjare por refreŝigaj restadoj, seminarioj kaj kursoj.

La ripozejo konsistas el ĉefa domo „VILA", konstruita komence de la 20a jarcento, malpli granda domo „CHALOUPKA", somera domo „LETNÍ PAVILON" kaj preĝejeto „KAPLE".

En „VILA" estas 1- ĝis 4-litaj ĉambroj kun duŝo kaj necesejo. Entute estas 43 litoj kaj la tuta konstruaĵo estas ekipita por uzantoj de rulseĝoj. En la domo troviĝas manĝejo, bufedo, librejo, saloneto por kaftrinkado kaj teraso por ripozi.

„CHALOUPKA" ebligas loĝadon de 26 gastoj en 2-4-6 litaj ĉambroj kun propra duŝo kaj necesejo.

„KAPLE" konsistas el preĝejeto en la 1a etaĝo kun 80 seĝoj, tre taŭga ankaŭ por koncertoj, kaj teretaĝa salono por 50 personoj, kie povas okazi prelegoj, distraj vesperoj kaj similaj programoj.

Ĉirkaŭe estas vasta (preskaŭ 3 ha) arborparko. Tie Vi povas trankvile promeni kaj ripozi en la ombro de maljunaj arboj. Sport-amantoj povas tie ludi volejbalon kaj tablotenison.

En la proksimeco de BYSTŘICE estas multaj interesaj turismaj lokoj (KROMĚŘÍŽ, ROŽNOV p. RADHOŠŤEM, TEPLICE n/BEČVOU).

Ni sincere invitas Vin partopreni 54an KRISTANAN KONGRESON de KELI, kiu okazos dum la tagoj 31.07. — 7.08.2004 en „SOLA GRATIA" en la urbeto BYSTŘICE pod Hostýnem (Ĉeĥio).

Pliajn informojn donos al Vi kaj aliĝilojn akceptas Pavel Polnický, prezidanto de LKK.

PAVEL ROLNICKÝ
Lesní 150/VI.
290 01 Poděbrady
Tel./fax: 325 615 651
Retpoŝto: cea.polnicky@quick.cz

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

# ALIĜILO

al la 54a KRISTANA KONGRESO de KELI
Bystřice pod Hostýnem, Ĉeĥio
31.07. —7.08.2004

Familia nomo ............................ Persona nomo ..................................

Adreso: ..........................................................................................

Lando: .................................... Telefono: ........................................

Faksilo: .................................. Retpoŝto: ........................................

Mi mendas ĉambron: unu-litan du-litan plur-litan

Mi estas vegetarano: JES / NE Mi preferas loĝi kun: ..........................

Dato:...................................... ..............................................
subskribo

Notoj de LKK:

La aliĝilon sendu al: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio.
Telefono kun faksilo: 420 325 615 651 — retpoŝto: cea.polnicky@quick.cz.
La kristanan kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.

**Organizaj informoj:**

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn — JES / NE

Mi povus prelegi pri:..........................................................................

Mi postulas (specialajn dezirojn): ..........................................................

...................................................................................................

Mi alveturos: trajne / aŭtomobile

kiam (proksimume):. ...........................................................................

**El la provizora programo:**

1. Oficiala malfermo de la kongreso
2. Interkona vespero
3. Diservo kun sankta manĝo
4. Prelegoj, kantado, dancado
5. Koncertoj
6. Jarkunveno de KELI
7. Tuttaga ekskurso al la urbo KROMĚŘÍŽ
8. Duontagaj ekskursoj — pieda al la pilgrimloko HOSTÝN
   — busaj — al la folklora muzeo ROŽNOV pod RADHOŠŤEM
   — al la baneja urbo TEPLICE nad BEČVOU.

BYSTŘICE pod HOSTÝNEM estas ĉarma moravia urbeto (20 km de PŘEROV kaj 28 km de VALAŠSKÉ MEZIŘÍČÍ). Ĝi estas atingebla trajne, buse kaj aŭtomobile. La kongresejo — SOLA GRATIA estas ripozdomo de Evangelia Eklezio de Bohemia Kunfrataro.

Je nia dispono estas preĝejeto, vasta parko, sportejoj, parkejo. Preskaŭ ĉiuj ĉambroj estas 1- ĝis 4-litaj kun propra duŝo kaj necesejo. Lifto uzebla. Kelkaj ĉambroj estas ekipitaj por rulseĝuloj.

| Sumoj estas en EURoj | La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo | | | Restadkosto |
|---|---|---|---|---|
| | ĝis 3 1.1 2. 2003 | ĝis 31.03. 2004 | post 1.04. 2004 | |
| Kategorio A | 10 | 20 | 30 | 90 |
| Kategorio B | 30 | 40 | 50 | 200 (250)* |

*unulita ĉambro

Kategorio A: Ĉiuj landoj sen B.
Kategorio B: Eŭropa Unio, Skandinavio, Svislando, Norda Ameriko.

- Monsendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
- Se eblas, uzu UEA-poŝtĝirkonton aŭ pagu prefere al UEA por konto KELK-P de KELI.